

Komuniko:

## DISTANCIĜO DISDE LA “PREMIO GRABOWSKI”

Pro la dubinda rilato de almenaŭ unu el la membroj de la komisiono, kiu decidas aljuĝojn ĉe la ‘Premio Grabowski’ de UEA, al judaj kaj aliaj politikaj aferoj, la ricevinto de la ‘Premio Grabowski’ (2008) pro la verko Svisa Enciklopedio Planlingva, Andreas Künzli, Svislando, persone distanciĝas de ĉi tiu komisiono kaj decidis forlasi la premion mem. La koncernita funkciulo apartenis ankaŭ al la komisiono, kiu kontribuis eviti, ke la judeco de L.L. Zamenhof estis honorita en la kongresa rezolucio de la jaro 2009. Krom tio, evidente li evitas mencii la holokaŭston en siaj prelegoj. Ankaŭ la konscia ignoro de ies judeco kaj de la holokaŭsto estas konsidereblaj formoj de antisemitismo.

En 2012, post kiam UEA akceptis oficialan ordenon de la komunisma vjetnama ŝtato, mi ekŝiĝis el UEA kaj definitive ekŝiĝis el la Esperanto-movado. Mi ne deziras esti premiito de organizaĵo(j), kiu(j) havas evidentajn simpatiojn por komunismaj ŝtatoj, kiuj grandskale lezis/as la homajn rajtojn kaj kiuj neniam agnoskis tiujn lezojn.

La ricevita sumo de USD 1000.- estis grandparte rehavigita de mi al UEA en formo de aĉetoj de libroj ĉe la libroservo.

Andreas Künzli  
[www.planlingvoj.ch](http://www.planlingvoj.ch)  
julio 2013